




LA VERDA LUPEO FENIKSO



Nr-ro 52

1981/1 Aprilo

12a jaro

Redaktoro: R. Burmeister
DDR 9047 Karl-Marx-Stadt
W.-Firl-Str. 30

Esperanto

profite una traŭnaŭne, ĝenerala
tutmonda Esperanto

**BRUNO
APITZ
NUDA
INTER
LUPOJ
ROMANO**

La famo romano de
Bruno Apitz (1900-1979)
„Nackt unter Wölfen“
aperis entute en 26
lingvoj.
En la internacia
lingvo Esperanto
la romano aperis en
la jaro 1974.

BRUNO APITZ

Postkarte
Carte postale



Kluba informilo de ELF-AREK

Redaktoro: R. Burmeister
DDR 9047 Karl-Marx-Stadt
W.-Firl-Str. 30

Novaj Esperanto-poŝtstampoj

PO 121 el Czestochowa

15.12 1980 denove en Czestochowa aperis E-stampo kun la teksto: 35 jaroj Esperanto en Popola Pollando. La portreto en la stampo prezentas mapon pri Pollando kaj E-stelon.

La ricevita ekzemplero havis bonan kvaliton. (bone stampita). Ekzistas speciala memoriga koverto. Dankon al Biesiada pro informo.


HU 76 el Budapest

Gratulon al la Organiza Komitato de Vintra Esperantista Ferio! Ili nin surprizis pro nova poŝta stampo okaze de tiu aranĝo, kiu havas tekston nur en Esperanto:

10-A VINTRA ESPERANTISTA FERIO

Simpatia "neĝviro", kiu portas E-insignon, ornamas tiun simpatian stampon. La stampokvalito estas sufiĉe bona. Dankon al Radnai k Fekete pro la senditaj informoj.

Ekzistas specialaj kartoj kun E-stelo en neĝkristalo kaj glumarkoj en verda kaj en flava.



GDR 9 el Leipzig

15.12. 1980 la ĉef-poŝtejo en Leipzig havis maŝinstampon kun germanlingva teksto: 15. Dezember/Tag des Esperanto-Buches (Tago de la E-libro).

La kvaliton de tiu stampo oni povas forgesi kaj apartenas al la plej malbonaj. La fuŝkvalito rezultas el apenaŭ uzebla stampomaŝino. Ne nur la stampomaŝino malbone laboris, ankaŭ la oficistoj tie terure fuŝis. Tiel oni ekz. aplikis iun germanlingvan maŝinstampon pri asekuro sur poŝtajoj, anstataŭ la E-ms.

GDR 10 el Leipzig

Samtage kun la maŝinstampo ekzistis ankaŭ memoriga nuliga stampo en la sama poŝtejo, havebla en speciala poŝtejo giĉeto. Tiu stampo havas la germanan tekston: 15. Dezember/Tag des Esperanto-Buches kaj en la stampomezo troviĝas bildo pri libro kun la E-teksto: B. Apitz/Nuda inter lupoj/1974.

La kvalito ĝenerale estas kontentiga. Tamen la poŝtejo same fuŝlaboris. Tiel oni aplikis ekz. tute normalajn datstampojn anstataŭ la E-stampon sur ekspeditaj leteroj, sekve ankaŭ pluraj niaj amikoj certe mikris, ke ili ricevis sensencajn leterojn el Leipzig.

Eble tiu romano "Nuda inter lupoj" meritas klarigon: Verkita ĝi estas de la germana verkisto Bruno Apitz pri vivo de infano pola en koncentrejo. Tiun infanon oni sukcesis savi antaŭ la mortigo kaj ĝi vivas en Pollando. Apitz mem dum multaj jaroj estis en koncentrejo. Tiu romano aperis entute en 26 lingvoj. En Esperanto la romano aperis en la jaro 1974 en GDR. Tradukis ĝin Karl Schulze el Berlin/GDR.

GDR 11 el Finsterwalde

5–12.1.1981 en Finsterwalde oni uzis meorigan nuligan stampon kun germanlingva teksto okaze de la 3a Internacia Medicinista Esperanto Konferenco, 15–19.7.81 en PR Bulgario. En la stampo estas portreto de Charles Richet. Li estis pioniro de Esperanto kaj fama franca fiziologo. Li vivis de 1850–1935. En la organo de UEA "Esperanto", decembro 1935 ni legas pri li:

"Profesoro Charles Richet

Meze de decembar 1935 mortis en Parizo profesoro Ch. Richet, unu el la plej grandaj scienculo de Francujo, en aĝo de 85 jaroj. Li estis fiziologo kaj okupiĝis pri plej diversaj sciencaj kampoj. Kiel profesoro de l'medicina fakultato en Parizo li fariĝis membro de la franca Akademio de la Medicino. En 1914 li fariĝis membro de la Scienca Akademio- Li publikigis senfinan nombron da sciencaj verkoj. Longatempe li direktis la grandan francan organon "Scienca Revuo". En 1913 li ricevis la Nobel-premion por la medicino.

Li estis pioniro de la aerveturado kaj subtenanto de altaj idealaj celoj. Kiel apostolo de l'pacifismo li partoprenis en ĉiuj klopodoj por la interkomprenado de la homano. Ne mirige do estas, ke li fariĝis varma amiko de Esperanto. En verkoj kaj artikoloj li defendis Esperanton.

... Li estis efektiva pioniro de nia movado, al kies eminenteco ni ŝuldas tiom da favoro por Esperanto en ĉiuj sciencaj kaj intelektaj rondoj en Francujo".


La stampojn vi provas ricevi en nia stampobanko.

Novajoj

Dum la kongreso de Sveda Esperanto Federacio aperos stampo 6 ĝis 8-an de junio en Malmö.

Stampo sur memoriga karto kostas 3 IRK, mendu ĉe stampa banko.

La Brazilia Esperanto-pm aperos la 27-an de julio en Brazilia. 65-a UK.



Esperanto-Domo Arnhem

Responde al la redaktora demando pri la stampo ESPERANTO-DOMO ARNHEM mi sendas jenan klarigon:

Unue iom da historio pri la deveno de la E-sta, uzita en siatempe tre fama ESPERANTO-DOMO en ARNHEM/Ned./

La Domo disponigis al la Ĉe-Instituto en Hago la tiam urbestro de la urbo Arnhem D-ro De Monchy, varma amiko kaj subtenantanto de la IL Esperanto. Li ellernis la lingvon kaj kelkfoje eĉ publike parolis en Esperanto, okaze de la internaciaj E-kursoj en Arnhem. Li estis ankaŭ komitatano de la Ĉe-Instituto. Somere 1936 okazis en la E-Domo internacia perfektiga kurso kun 70 personoj el diversaj landoj. Tiam s-ro Perrin el Calais /Francio/ faris interesan peton al la ĉeestanta s-ro J. W. Groeneijk, inspektoro de la Nederlanda PTT el Hago, ke la poŝtdirekcio permesu al la E-Domo uzi propran poŝtstampilon por la stampado de leteroj, elirantaj el la E-Domo.

S-ro Groeneijk tuj pritraktis la proponon ĉe la ĝenerala direkcio de la ned. PTT en Hago, kiu promesis realigi la aferon en la venonta jaro 1937. Tiel ankaŭ okazis. La nekutimforma stampilo montris la daton de la ekspedo kun la vortoj: ESPERANTO-DOMO ARNHEM kaj la radiantan E-stelon.

En la koridoro de la Domo estis instalita propra poŝtkesto, kiun ĉiutage malplenigis la deĵoranta poŝtisto. Mi memoras, ke la afrankitajn poŝtaĵojn nuligis la rajtigitaj personoj en la giĉeto s-ro L. Moreau, la entuziasma kaj oferema administranto de la E-Domo aŭ f-ino B. Bresler, la sekretariino. En la oficejo estis vendataj bildkartoj, leterpaperoj, poŝtmarkoj, skribiloj ktp.

La alia dulinia stampo ESPERANTO DOMO ARNHEM, pri kiu estas la demando en la artikoleto de s-ro Amouroux, laŭ mi ne estis ia "poŝtkontora" stampo. Tiun stampon oni uzis jam antaŭe sur ĉiuj korespondaĵoj de la E-domo kun akompana subskribo de la administraj personoj. La farbokuseneto servis por ambaŭ stampiloj: La domoficeja dulinia – nepoŝta kaj la oficeala poŝta. Mi mem posedis 3–4 leterojn kun tiu nepoŝta stampo.

Kompilita laŭ propraj notoj kaj laŭ mencioj en la revou LA PRAKTIKO 1936–1937.

D. Bartoŝik

Werner Simon pri stampo Hago 1920 (UK)

"... mi petis tian amikon esplori la Hago-1920-stampon kaj jen lia respondo: La stampo estas nek oficiala nek poŝta. La nederlanda katalogo de poŝtstampoj ne listigas ĝin. Specialisto pri holandaj stampoj, komercisto, same neas oficialecon de tiu stampo.

Tamen estus eble, ke oni eraras. Vi havis 2 opiniojn ĝis nun, unu por kaj unu kontraŭ. Do: restas iom da dubo. Nepre ĝi nur estas "apudstampo" (vidu sube!), ĉar kiel bulteno 47 skribas, la korespondaĵoj estis transdonitaj al centra poŝtofiĉejo por normala stampigo! Estas eble, ke la poŝtoficisto aplikis neoficialan (suveniran stampon de LKK) stampon kiel komplezon.

"Apudstampo" = Memoriga (suvenira) stampo, kiu normale troviĝas apud la pm.

Opinio de redaktoro: Jes, restas dubo pri oficialeco de tiu stampo. Tamen la posedantoj estu feliĉaj, ĉar nepre temas pri kongresa dokumento. Eble iam ni solvos tiun problemon. Ni eĉ ne kapablas solvi tiun problemon, ĉu nun la pasintjara jugoslava stampo estis poŝta aŭ ne. Sed legu mem leteron, kiu atingis redaktoron en februaro 1981.

Pri la stampo de Rijeka 1980

... Mi partoprenis la kongreson kaj mi volas rakonti al vi ion pri la situacio koncerne la Esperanto-stampon. En la kongresa libro de la 53a SAT-Kongreso sur la paĝo 12 mi legis ke oni dum la unuaj du tagoj de la kongreso povas ricevi E-poŝtstampojn kaj kovertojn en la kongresejo. Mi demandis kelkajn funkciojn, sed neniu sciis ion pri la stampo. Mi ankaŭ demandis en la ĉef-poŝtejo pri ĝi: la stampo estis nekonata. Lunde (tio estis la tria kongrestago) mi rimarkis ke iu jugoslavo vendis stampitajn kovertojn. Tiu sama homo ankaŭ vespere vendis tiujn stampitajn kovertojn, kiam okazis kunveno de kolektantoj. La nun preparolitaj kovertoj ĉiuj surhavis presitajn stampojn. Mi pensas, ke la stampoj ne estas poŝtaj kaj ne taŭgaj por nia filatela kolekto, kvankam la kovertoj ĉiuj surhavas ĝustan afrankon por enlanda transporto. Interese, ke la jugoslavo havis ankaŭ la saman stampon kun verda koloro (ĉu li havis stampilon k kusenon?). Oni donis la stampon ankaŭ kiel "apudstampo" apud la markoj en verda koloro. La poŝto nuligis la markojn per normala datstampo. (Kiu estas "oni"? Eble tiu jam menciita jugoslavo propramane stampis per propra kuseno – aŭ ĉu eble poŝta ĝiĉeto en la kongresejo havis la stampilon?)

Redaktora noto: Mi esperas, ke niaj novmembroj el Jugoslavio kapablas klarigi la situacion, same mi petas nian nederlandan amikon kiu ankaŭ estis en tiu kongreso, sendi al ni leteron kun klarigoj pri tiu stampo.

Jam nun ni povas diri, ke la verda koloro nepre ne estas poŝta, eble la tuta stampo estas nepoŝta. Ni do atendas sciigon, kie estis la poŝtejo kun la koncerna stampilo, se ne en kongresejo aŭ ĉefpoŝtejo.

Pri reko-markoj:

Ekzistas katalogo pri nederlandaj reko-markoj kaj la redaktoro estas konata al mi. Li skribis, ke dum FLE-Kongreso en 1947 speciala reko-marko estis uzita "Hoensbroek/Treebeek/HtbK" ... ĉu eblas aperigi detalojn pri la reko-markoj Hago 1937 kaj Amsterdam 1940 k.a. ĝisdate nekonataj?

Werner Simon

Redaktoro: Mi ne tion povas, sed esperas, ke niaj klubanoj vigle trafoliumu siajn kolektojn por trovi tiujn reko-markojn kaj sendi foto-kopiojn al redaktoro por la informilo. La tereno de la reko-markoj ankoraŭ ne esplorita. Ni klopotu iomete heligi tiun flankon, se ĉiuj kunhelpas tiam ni ankaŭ sukcesos!

Novaj afrankstampoj

Nia afrankstampspecialisto Werner Simon skribas:

"... mi nun povas sendi al vi fotokopion de la afrankstampo 17731 Zamenhofdreef el Utrecht. (Super indiko Zamenhofdreef estas skribita: Radar). Tiu stampo bedaŭrinde ne plu estas havebla... Nova surprizo por ni estas, ke ankoraŭ alia holanda afrankstampo ekzistas en alia urbo kun adreso "Zamenhoflean" en la stampo. Mi esperas havi detalojn pli poste. Temas pri la stampo numero FR 15883..."

Dankon, amiko Simon!

Ĉu la stampo de Rosario (1941?) estas poŝta?

Tion demandas nia Werner Simon. Mallonge ni skizis la aferon en nro 43 de nia informilo. Sed ankoraŭ ni ne scias, ĉu ĝi nun estas poŝta aŭ ne. Amiko Vana! Bonvolu sciigi al ni viajn intertempajn eksciojn ĉirkaŭ tiu stampo. La fotokopion pri la stampo ni aperigis en nia informilo nr 49.

Kaj kio pri HI 22?

Mi ricevis stampon pri 40a hispana kongreso. Kun datoj 21–24 julio 1980. Tamen la koverto montras datojn 19–24 julio. Do, kiam okazis la kongreso, kaj ĉu la stampo entute estas poŝta sen iu definitiva dato?

Redaktoro: Tutcerte temas pri poŝta stampo, ja ankaŭ ekz. la lasta UK-stampo el Stokholmo havas tian grandegan daton. Sed kion ni ne scias, tio estas, kiam nun vere okazis la hispana kongreso. Jam ĉe pli fruaj hispanaj tutaĵoj mi rimarkis tiujn dato-diferencojn de la stampo kaj de la koverto.

Filozofa Francis Bacon ankaŭ sur pm!

... Eble ne ĉiuj scias, ke portreto de F. Bacon troviĝas ankaŭ sur 6 c. pm de New-foundland de la jaro 1910.

Bedaŭrinde mi ne posedas la Zumstein-katalogon, nek alian kaj mi ne scias, sub kiu kataloga numero ĝi estas listigita. Mi mem nur tre malfacile akiris tiun pm – neuzitan. Sufiĉe kosta ĝi estis kaj verŝajne nefacile trovebla. Tamen en bona tema E-kolektaĵo ĝi trovas taŭgan lokon apud la Bacon-sta el Karl-Marx-Stadt 1980, kiu cetere al mi tre plaĉas...

Bartoŝik

Pri la tutaj-katalogo

Estas konate, ke jam dum jaroj sin okupas nia kluba amiko Vladimir Vana pri kompilado de tutajkatalogo. Li tion faris tre zorge kaj kun alta faka sperto. Laŭ mia scio la manuskripto jam estas preta.

Por ke tiu katalogo restu ĉiam sur aktuala nivelo necesas, ke ĉiuj niaj klubaj geamikoj informu la redaktoron pri tiurilataj novaĵoj. Tiuj informoj unue trovos lokon en nia informilo kaj poste lokon en la kartoteko de nia Vana.

Por memorigo: tutaĵoj estas poŝtaj kartoj kaj kovertoj kun oficialaj kaj duonoficialaj alpresoj. Estas tute superflue, ke alia, en tiu rilato nesperta persono, komencu kompiladon de tiu katalogo.

Pri glumarkoj

Volonte mi donus raporton de nia "glumark-fakulo" Tremon, sed jam preskau jaron mi ne ricevis iun sciigon. Niaj glumarko-kolektantoj havu paciencon, el de aliaj klubaj amikoj senditaj informoj ni kompilos liston pri novaĵoj kaj sekvontnumere aperigos ĝin.

Esperanto en italaj filatelaj ekspozicioj

25 kolektoj troviĝis en la 4-a Filatela Fervoja Ekspo de Milano. Inter ili 1 kolekto pri Esperanto.

En Taranto okazis la Italia Bella 80, ankaŭ tie trovis lokon la ekspozajo de Germano Gimelli.

En Lucca okazis ekspozicio dediĉita nur al Esperanto sub la nomo: Dua Ekspozicio kaj Nacia Kunveno dediĉita nur al Esperanto kun la partopreno de la Internacia Ligo de esperantistaj instruistoj. En la ekspozicio partoprenis pluraj esperantistaj kolektantoj el kiuj kvin ricevis premion. (I.a. la geedzoj Gimelli). En la kadro de tiu aranĝo parolis i.a. doktoroj Mario Dazzini kaj Antonio de Salvo. Okazis ankaŭ Sankta Meso.

La filatela kaj numismatika Asocio en Lucca kaj IEF eldonis memorigan karton.
Informoj senditaj de Gimelli

Pri ITA 32 aldone:

Apud kongresaj karto kaj koverto estis eldonita ankaŭ de la "Centro Filatelico Numismatico Sipontino" karto, kiu montras la renkonton de Sankta Laurencio Majorano, kiu rajdis sur blanka ĉevalo, kun Totila, reĝo de la "Gotoj". La rajdanta Sankta Laurencio estas videbla ankaŭ sur nia porokaza speciala Esperanta poŝtstampo. (Vidu informilon nr 51)

Gimelli

Afrankstampo nro 8: detaloj

"Gewinnen Sie Freunde in 99 Ländern mit Esperanto" (Akiru amikojn en 99 landoj helpe de Esperanto) estas la iom troiga enhavo de tiu afrankstampo de Hermann Behrmann el Paderborn. Dum la tempo tiu stampo iom variigis kaj jen la ĝisnunaj konstatoj:

8-1 uzita en urbo Löhne

8-2 uzita en Paderborn (479) = datstampo, tekstparto, valorstampo

8-3 uzita en Paderborn 4790 = tekstparto, datstampo, valorstampo

Nia amiko Hirsch informis, ke ek de oktobro 1980 oni en Paderborn uzas novan afrankstampon, sed mankas ĝis nun detaloj.

E-poŝtkartoj de GDR (daŭrigo el nro 49)

- | | |
|---|---------------|
| 11. Ila Konferenco de Medicina Fakrondo | (CLE Berlin) |
| 12. Eldiro PLATON | (DLR Cottbus) |
| 13. Apitz, Nuda inter lupoj | (DLR Leipzig) |
| 14. Apitz, sama, sed en germana | (DLR Leipzig) |
| 15. Charles Richet | (DLR Cottbus) |
| 16. Ludwig Renn (prezidinto de IAREV) | (DLR KMStadt) |
| 17. III-a Centra E-Konferenco en GDR | (DLR KMStadt) |

Krome aperis noveldonoj de la E-pk de GDR:

7, 8 kaj 9. Por presado estis uzataj samaj presklišoj.

Sed sube troviĝas iom aliaj "prespermes-notoj":

Anstataŭ III-18-210 LpG 541/80 en la noveldonoj estas:

3-18-210 LG 116/35/80

Mi ripetas: Temas pri tutaĵoj, kiuj estas klasifikitaj en la Filatela Tutaĵ-katalogo de GDR sub kategorio "C", tio estas: normalaj poŝtkartoj kun privataj alpresoj, (por alpresoj necesas ŝtata permeso).

Devoj por niaj klubaj geamikoj!

Ni estas amika rondo kaj pere de nia informilo helpas unu al la alia kaj diskutas pri niaj problemoj. Tamen la afero estas tiel, ke ni nur tiam povas frandi de nia komuna tablo, se ĉiuj klopodas kontribui al nia menuo. Kompreneble al tiuj kontribuoj apartenas inter alie la kotizo, sed ĝi ne okupas unuan rangon. Multe pli grava estas, ke niaj estimataj klubaj geamikoj aktive kunlaboru en nia informilo! Jen kelkaj "devoj":

1. Se vi partoprenas en E-aranĝo, raportu al redaktoro pri ĉiuj interesaj por nia klubo eldonaj detale kaj amplekse. Al tio apartenas poŝtaj stampoj, privataj stampoj, loko de poŝtejo, variaĵoj de la stampo, datoj de ĝia uzado ktp. Informoj pri uzitaj memorigaj kartoj kaj kovertoj, glumarkoj.
2. Ankaŭ se vi ne partoprenas en tia aranĝo, peru viajn eksciojn al la redaktoro.
3. Ne forgesu informi pri insignioj, kvankam al mi persone ŝajnas, ke neniu en nia klubo interesiĝas pri tiuj, ĉar tute ne venas informoj pri tiu fako.
4. Kelkaj landaj asocioj, fakaj ascioj kaj lokaj kluboj por la korespondado uzas "oficialajn" (asociajn) konvertojn au pk. (Ekzemple UEA, IFEA, Norvega Fervojista E-Asocio kaj CLR Berlin). Ankaŭ pri tiuj necesus skribi en nia informilo, ĉar "uzitaj" ili bone taŭgas por filatelaj E-ekspozaĵoj. Kompreneble: estas plena iluzio voli fari katalogon pri tiu ĉi kampo. Eblas nur, de tempo al tempo aperigi notojn pri tio.
5. Eĉ se vi nenion povas raporti, de tempo al tempo diru kuraĝigan vorton al via redaktoro. Kelkfoje ŝajnas, ke ni sendas nian informilon en fornon, de kie ne eblas ricevi leteron de leganto.

La jaro 1980

estis sukcesa por nia Esperanto Ligo Filatelista (Arek) kaj ni havis riĉan rikolton je novaj stampoj. La stampo en januaro 1980 el Finsterwalde estis la entute 570a kaj tiu de Budapest en fino de decembro la 592a E-poŝtstampo. Al la stampo-rikolto kompreneble ankaŭ apartenas vico da novaj afrankstampoj, kiujn multaj el inter ni ankoraŭ subtaksas, kvankam ili estas plenvoloraj filatelaj dokumentoj. Krome ni elfosis el la sino de forgeso 2 ĝisdate nekonatajn stampojn kaj ni komencis pripalpi la rekomarkojn, de kiuj ekzistas pli ol ni ĝis nun listigis. Niajn albumajn paĝojn krome buntigis vico da novaj tutaĵoj el Bulgario kaj GDR.

Nia stampobanko funkciis bone sub la gvido de Werner Heimlich. Nia informilo aperis sufiĉe akurate kaj trovis laŭdon, kvankam ekzistas teknikaj k lingvaj mankoj.


Ni eĉ havis 2 renkontiĝojn: en Leipzig kaj en Stokholmo. 1981 ni estis invititaj al Valtice, sed pri tiu renkontiĝo mankas ankoraŭ detalaj informoj.

Nia prezidanto Paulsson mendis kunvenejon por la kolektantoj en la ĉi-jara UK en Brazilo. Eble iu el niaj europaj klubanoj sukcesos veturi tien. Bonvolu nepre ne forgesu informi pri filatelajoj de la kongreso al nia redaktoro. Por la kunveno ni bezonas gvidanton. Partoprenontoj sin anoncu ĉe Paulsson. Malpli sukcesa estis la kasraporto, kiu elmontras la kutiman truon. Mildigebla la defecito estus, se ĉiuj korespondantoj aldonus IRK por respondo, se ili skribas al Paulsson. Malpli agrable aspektas la tereno de nia glumarko-fako. La redaktoron atingis neniu signo, sekve ankaŭ informado pri novaj glumarkoj estas iom magra. Tamen la aktiva kunhelpo de kelkaj niaj klubaj amikoj ebligis kelkajn informojn. Eble io okazis al nia glumark-fakulo?

Anonco:

Ie en la hodiaŭa informilo ni lokigas "pornografian" karton. Kiu deziras ĝin akiri, sendu 1 IRK al nia membro.

Dr. Giso Brosche, DDR 7981 Rückersdorf.



ELF-Arek gratulas!

Vladimir Vana ricevis orumitan, Dolfa Bartošik arĝentan kaj Jan Hadamek arĝentumitan medalojn pro iliaj altkvalitaj ekspozajoj pri temo Esperanto en la "Nacia Ekspozicio de Motiva Filatelio PRAHA 80" (okazis 25.10 – 2.11.1980 en ZK KOTVA, Praha 1, Revoluĉni 3) Aperis ankaŭ afiŝo kun 9 diverstemaj simboloj, inter ili la E-stelo.

Medalojn por filatelaj ekspozajoj ricevis ankaŭ geedzoj Gimelli en filatelijaj ekspozicioj okazintaj 1980 en Italio. Nia klubo deziras al la ekspozantoj novajn sukcesojn. Ni esperas, ricevi sciigojn ankaŭ pri la sukcesoj de aliaj ekspozantoj.

Bonvenon al novaj amikoj de nia klubo!

Marco Hugo Pedraz, Menorca 1-1, Lugo, Hispanio
Kolektas: Pm kaj stampoj "ktp." (sendis duonan kotizon)

Salvador Raymundo, CP 11032 Batel, 80 000 Curitiba, Parana, Brazilo
Kolektas: E-filatelajojn

Pierre Thaey, Pieter Reypenslei 47, B-2510 Mortsel, Belgio
Kolektas: E-filatelajojn kaj neuzitajn pm pri natur-protekto

Kasraporto de I. Paulsson:

Enspezoj 1980	2.194 skr
Elspezoj 1980	2.765 skr
Deficito:	571 skr

Januaro 1981

2a suplemento por la stampokatalogo

(eldonita 1978 de ELF/AREK)

BEL	1-A	Gent	1937	29.3	Laborista E-kgr 22a	28
ARG	5	Rosario	1973		Juvenil de E	ms
FRA	43-1	Grenoble	1977	feb-majo	Nacia E-kgr 69a	ms 45x24
	43-2	Grenoble – Centre Tri	1977		Sama tekstoparto (tp)	
	43-1	Grenoble	1977		tp ankaŭ kapopieda	
HUN	5-1		1947		Esperanto-teksto	
	5-2		1947		Teksto en la hungara	
HUN	70	Abaliget	1979		IREN 12a	35
			1980	14–23.7	IREN 12a (reuzo por 13a)	35
HUN	71	Fot	1979	18.11	Deklamkonkurso	
BRA	30	Bauru	1979	15.12	Filatela E-ekspozicio	
POL	119	Czestochowa	1979	15.12	Zamenhof	
HUN	72	Budapest	1979	28–12	VEF 9-a (kun fuŝita 8)	
GDR	5	Finsterwalde	1980	5–12.1	15 jaroj E en Kulturligo (Cartesius-portreto)	40
BRA	31	Sorocaba	1980	23–27.1	3a junulara E-renkontiĝo	
GDR	6	Leipzig	1980	7–14.3	IFER 80	40
GFR	31	Koblenz	1980	12.4	Servo per amikeco	ovala 45x34
HUN	73	Tata	1980	2.5	Junulara E-renkontiĝo	
GDR	7	K-M-Stadt 1	1980	5–12.5	15 jaroj E en Kulturligo (F. Bacon portreto)	40
POL	120	Bydgoszcz 1	1980	31.5	E-renkontiĝo (en pola)	
GDR	8	K-M-Stadt 1	1980	5–11.6	E-med. konferenco (Kalocsay-portreto) fuŝdato: 11.16.80	vi ni 40
POR	2	Setubal	1980	13.6	E-renkontiĝo (8a)	32
HUN	74	Dunakeszi	1980	6.7	Fervojista E-renk. 16a	35
HUN	75	Gyula	1980	7.7	SEU	
BUL	11	Plovdiv C	1980	12–14.7	Nacia E-kgr 40a	as 33
ARG	6	San Luis	1980	13.7	Tutamerika E-kongreso	35
JUG	26	Rijeka	1980	18–19.7	SAT-kgr 53a	pres. ni vi 33
HIS	22	Madrid	1980	21–24.7	Nacia E-kgr 40a	32
MAL	2	Valletta	1980	25.7	ILEI-konferenco 14a	30
SVE	24	Stockholm	1980	2–9.8	UK 65a	30
ITA	32	Lucca	1980	28.9	E-filatela ekspozicio	38
POL	121	Czestochowa	1980	15.12	35 jaroj E en PR Pollando	
GDR	9	Leipzig	1980	15.12	Tago de E-libro	ms 39x21
GDR	10	Leipzig	1980	15.12	Tago de E-libro (Titolo: Nuda inter lupoj)	40
HUN	76	Budapest	1980	28.12	VEF 10a (neĝviro)	
GDR	11	Finsterwalde	1981	5–12.1	IMEK 3a (en Bulgario) (portreto de Richet)	40

Afrankstampoj:

AS	8-1	Löhne	1971		Freunde in 99 Ländern mit E	
AS	8-2	Paderborn	1975		sama (ds-tp-vs)	
AS	8-3	Paderborn	1980		sama (tp-ds-vs)	
AS	15	?			Zamenhoflaan (FR 15883)	
AS	16	Utrecht			Zamenhofdreef (nro 13061)	
AS	17	Utrecht			Zamenhofdreef (nro 17731)	
AS	18	Aarhus			Esperanto . . . (nro TN 471)	
AS	19	Bad Hersfeld			Esperanto . . .	
AS	20	Sidney			Esperanto . . .	

Ceteraĵoj

HUN 65 1978 28.12 – 2.1.79 (?)
LUK 1 1978 1–9.9
1979 7–14.8 (reuzo)
POL 30 kun fuŝdatoj: 24.17.65 kaj 25.17.65 (trovitaj 1980 de Bielak)

Noto

Nepre plibonigenda estas la kunlaboro flanke de kelkaj niaj membroj. Se ni ne ĉiuj kontribuas per informoj pri novaj stampoj (kun dato de uzado), tiam ne eblas prezenti kompletan informadon pri novaĵoj. Tiel ekz. ne alvenis ĝis januaro informoj pri la stampo de Rijeka 1980, nek de kongresanoj nek de klubaj membroj el JUG. (Ekz.!)
Mi povus noti pliajn landojn.

Bonvolu:

Se en via lando aperas nova stampo, aŭ se vi ĉeestas kongreson kun nova stampo, tiam sendu al la redaktoro almenaŭ unu bone legeblan specimemon k informu ankaŭ pri samtempe uzataj tutaĵoj (suvenir-, memorkartoj kaj kov.)

Adreso:

R. Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30
Redaktoro de "La Verda Lupeo" kaj Katalogo de E-stampoj de Esperanto Ligo Filatelista (ELF-Arek).



III. ESPERANTO-KONFERENZ IM KULTURBUND DER DDR



Karl-Marx-Stadt · 22. – 24. Mai 1981

Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

v: ne pagis 1981

Prezidanto:

I. Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3
Poŝtkonto: 51 57 85-4, I. Paulsson, Solna

Kotizo por 1981:

15 validaj IRK (maldekstre stampitaj!! ne pli aĝaj ol du jaroj!!)
aŭ 30 svedaj kronoj. Prefere sendu la monon!
La kotizon sendu al Paulsson.

Stampobanko:

Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4
Aĉetas novajn E-stampojn kontraŭ 1 IRK, ofertas multajn stampojn. Petu liston
kontraŭ 1 IRK.



"vi ne havas – vi ricevos!"